

Literatura Mondo, 16-a parto : Hans Weinhengst
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 642, 1976.01.28 & 31

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La aŭstro **Hans Weinhengst**, kies romanon **Tur-strato 4** publikigis **Literatura Mondo** en 1934, restis tute nekonata de la esperantista publiko, kvankam lia romano povas esti konsiderata kiel unu el la ĉefverkoj de nia literaturo kaj kvankam liaj noveloj, kiuj aperis de tempo al tempo en **Literatura Mondo**, ĉiam respegulas eksterordinaran verkistan personecon.

A.- Jen kiel **Ferenc Szilágyi** en 1936 resume prezentis la romanon **Tur-strato 4** de **Weinhengst**. Ni citas eron el la eseo **Literatura hazardo** aperinta en **Lingvo Libro**, aldono al **Literatura Mondo** :

Cl.- « Unu el lastaj romanoj de la Esperanta literaturo estas *Tur-strato 4* de **Weinhengst**. Jen verkisto, en kies romano ne la homfiguroj havas la ĉefan rolon, sed la krizo, la senlaboreco, kies efiko povas esti aŭ senmoraligo aŭ memmortigo. La romano havas tute karakterizan tendencon. Ĝi ne predikas rekte, sed la intenco de la aŭtoro estas ne miskomprenbla. Estas interese, kiel akre konturiĝas ĉi tie la rolo de la hazardo. Denove junulo kaj junulino amas unu la alian. Du familioj, du medioj en la atmosfero de la senlaboreco. La knabino malfrue alvenas hejmen. Obtuzo familia sceno sekvas, la patro estas furioze ebria ; - ne, li ne estas kulpulo, sed viktimo de la milito. Lin forportas la polico, por ke la sekureco de la familio estu gardata. Sed en la ĉelo li resobriĝas, vidas la malesperan situacion kaj mortigas sin. Kaj fine la samon faras la du geamantoj, kiuj vidas, ke bonaj ili ne povas resti kaj feliĉaj same ne. La lasta sono de tiu ĉi melankolia simfonio estas la siblo de la gaso, kiu plenigas la aeron super la kadavroj de la juna paro. »

A.- Estas kurioze, ke SAT, kiu ĉiam propagandis favore al klasbatala literaturo neniam provis reeldoni la romanon **Tur-strato 4** de **Weinhengst** kaj la aliajn verkojn de tiu ĉi talenta verkisto mortinta tro frue dum la naziisma invado de Aŭstrio. Povas esti, ke eĉ en la SAT-medioj oni nekonas tiun ĉi priskribinto de la laborista vivo.

Cl.- Jen hodiaŭ citadoj el artikolo titolita **Hans Weinhengst pri si mem**, aperinta en 1934 en **Lingvo Libro** kaj kiu alportas sciigojn pri tiu ĉi mistera aŭtoro.

A.- « Mi estas esperantisto ekde 1927. ... Mi konfesas, ke, kiel aliaj, mi komence ĉiam pensadis pri plibonigo, rekreo kaj perfektigo de la lingvo, kiu ŝajnis al mi longe iom infana kaj barbara. Sed pli enprofundiĝinte en la lingvon kaj ĝian spiriton, mi kutimiĝis al ĉio « stranga » kaj konsciiĝis pri io, kio plene kuracis min de « reformemo », nome : mi mem ekkoleris ĉiam, vidante, ke iu volas reformi, ŝanĝi ion en Esperanto, trudi al la aliaj siajn perfektigojn kaj plimalfaciligi la lingvon.

Cl.- Baldaŭ mi vigle partoprenis en la distrikta kaj tutviena laborista Esperanto-movado. ... Mi komencis verki poemetojn kaj rakontetojn, el kiuj kelkaj estis publikigitaj en Esperanto-gazetoj laboristaj. Parolĥorojn kaj scenojn mi skribis ĉefe laŭ petoj de festkomitatoj, kiuj bezonis materialon por prezentadoj. ... Mi tute ne volas esti poeto aŭ verkisto; se mi sentas en mi deziron, ion elparoli aŭ rakonti, mi diras aŭ skribas ĝin. ...

A.- La temo [de Tur-strato 4] ? De kie mi ĝin prenis ? Nu, de la vivo mem. Kelkaj legintoj de la libro jam riproĉis al mi, ke ĝi estas tro nigre-pentra, malgajiga. Iuj asertas eĉ, ke ĝi apelacias al la larmglandoj. Nu, tiuj homoj ŝajnas feliĉe ne koni la malhelan flankon de la vivo, de nia socio. Ili iru en mian vivmedion kaj ili trovos eble multe pli malgajigajn aferojn. Tro multe estas jam skribate pri reĝoj, krezusoj... kaj aliaj feliĉuloj de sunflanko de la vivo. Sed neniam sufiĉos skribi pri tiuj de la alia. Mi ne verkos por simple verki, sed por kunhelpi laŭ mia modesta eblo ekskui, pliraciigi kaj plijustigi la mondon. ...

Cl.- Pri la esperanta stilo ? Nu, mi opinias, ke ĝi estu kiel eble plej simpla, internacia, tio estas racia, klara kaj **libera**. Estus malfeliĉo, se ĝi tiel rigidiĝus kaj malsimpliĝus, kiel tiu de diversaj naciaj lingvoj. ...

A.- Ĉu mi nun verkas? Jes, certagrade mi preskaŭ ĉiam verkas, sed mi ne scias, ĉu kaj kiam mi ion publikigos. Mi ofte detruas, kion mi faris, pli poste konstatante ke ĝi nenion taŭgas miaopinie. Mi nun skribas romanon aŭ ion similan pri knabo. Sed ĉar mi ne scias ĉu ĝi iam aperos, mi ne volas paroli pri ĝi. Mi ne ŝatas paroli pri propraj laboroj ; ne pro modesteco, sed ĉar ne utilas paroli **dum** la plenumo de ĝi, ne sciante ja la sukceson, kaj ĉar post fino de laboro superfluas. Tiam parolos ja pri ĝi la aliaj, kiuj ekzamenas kaj juĝas ĝin.

Cl.- Kion mi sentis vidante mian unuan verkon presita en la mano ? Nu, sincere, komence vere ian ĝojon. Poste, mi ne scias, kvazaŭ ian bedaŭron. La verko fremdiĝis al mi, ne plu apartenis al mi. »

A.- La venontan semajnon, por ke vi iom intimiĝu kun **Hans Weinhengst**, ni legos al vi eron el unu el liaj noveloj aperintaj en **Literatura Mondo**.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!